

# Ipl 30 (3/99)

## Inhalt

1	Pri la faka profilo de la 84-a Universala Kongreso de Esperanto (Detlev Blanke).....	2
1.1	Strategia forumo.....	2
1.2	La Akademio parolas .....	2
1.3	Terminologia agado .....	3
1.4	Esperantologia konferenco .....	3
1.5	Seminario: Lingvoj en Interreto.....	3
1.6	Pri minoritata lingvo.....	4
1.7	Lingvistoj rigardas la kongreson .....	4
1.8	La dua Nitobe-simpozio .....	4
2	Neýtralaj lingviloj (Lluís de Yzaguirre í Maura) .....	6
2.1	La rolo de teknologio en la estonteco de lingvoj.....	6
2.2	La rolo de merkataj leøoj en la produktado de lingviloj.....	6
2.3	Alternativoj.....	6
2.4	Neýtralaj lingviloj.....	7
2.5	Ireblaj vojoj .....	8
3	Interlingvistiko kaj esperantologio en sciencaj konferencoj kaj kongresoj .....	8
3.1	Internacia studenta kongreso en Vladivostoko (Aleksandr Titajev) .....	8
3.2	Esperanto denove en lingvistika hungara konferenco (Katalin Smidéliusz).....	9
3.3	Dum konferenco de GAL pri Esperanto kaj kulturo .....	10
3.4	Pri propedeýtiko en konferenco pri lingva akiro .....	10
3.5	9-a konferenco de GIL pri eýropa lingvo-politiko .....	11
4	Fundamenta verko pri la frazeologio de Esperanto .....	12
4.1	Planlingvo kaj frazeologio: empiriaj esploroj pri reproduktita lingvomaterialo en Esperanto – tezoj - (Sabine Fiedler).....	12
4.1.1	Enkonduko .....	12
4.1.2	Difino kaj klasifiko de Esperanto-frazeologio .....	13
4.1.3	Evoluo de Esperanto-frazeologio.....	15
4.1.4	Uzado de frazeologiaåoj .....	16
4.1.5	Finaj rimarkoj.....	17
4.2	Publicaåoj de Sabine Fiedler .....	18

Kiom internaciskale Ipl reflektas interlingvistikajn kaj esperantologiajn aktivaåojn, dependas de ricevataj materialoj kaj informoj.

Pro tio mi bonvenigas æiujn taýgajn materialojn kaj petas pri sendo de raportoj per la reto aý sur diskedo. Mi bibliografias nur materialojn ricevitajn.

Red.

# 1 Pri la faka profilo de la 84-a Universala Kongreso de Esperanto

La 84-a UK okazis de la 31-a de julio ĝis la 7-a de aŭgusto 1999 en Berlin. Observanto de tiaj kongresoj povas havi interesajn ekkonojn pri la funkciado de planlingvo. Tio certgrade funkciis dum la 84-a, kies faka programo estis aparte riĉa.

La kongreso havis tradiciajn programerojn kiel la prelegojn de la Internacia Kongresa Universitato (kaj kursoj de AIS), la esperantologian konferencon ("Esperantologio komputile"), la traktadon de la kongresa temo („Tutmondiĝo – ĉanĝoj por la paco?“), diversajn kursojn kaj ekzamenojn, la tagon de la lernejo, aranĝojn de la fakaj asoci(et)oj ktp.

*Internen direktitaj*, do al la esperantistaro mem, estis la strategia forumo, la du aranĝoj de la Akademio, la terminologia kunveno kaj la kurso pri la soraba.

*Eksteren direktitaj*, do unuavice al neesperantista publiko, estis la Dua Nitobe-simpozio kaj la malfermo de la kongreso por interesitaj lingvistoj (du interligitaj iniciatoj), krome tri gvidadoj tra la kongreso por interesitoj el la urbo.

## 1.1 Strategia forumo

Plian fojon, post la lastjara kongreso en Montpeliero, okazis strategia forumo por diskuti la problemojn de la esperanta lingvo-komunumo.

Tio ĉi estas tre grava, ĉar periode revenadas la tempo por analizi la pozicion de Esperanto en la ĉanĝanta mondo kaj tiri certajn (certe ne unuecajn) konkludojn, almenaŭ por la agado de UEA, sed eventuale ankaŭ por la aliaj partoj de la ideo kaj strukture heterogena parolantaro de Esperanto.

## 1.2 La Akademio parolas

La Akademio de Esperanto unuan fojon enkondukis programeron kun la titolo „akademianoj parolas“ kun prelegoj de *Geraldo Mattos* pri la participoj kaj *Ilona Koutny* pri la esperantaj vortradikoj (ambaŭ eternaj, sed ja interesaj temoj).

En sia publika kunveno la akademianoj ne nur respondis la kutime venantajn demandojn sed ankaŭ prezentis prelegetojn (*Spomenka Ptivec* pri la akademia kolokvo en 2001, *Stefan Maul* pri la lingva konsultejo kaj *Carlo Minnaja* iom pri la historio de la akademio). Ja iam gravegus tute principa diskuto pri la rolo, strukturo, konsisto, funkciado kaj laboro de la akademio post la jaro 2000.

### 1.3 Terminologia agado

Ke daŭre sentatas la bezono pri sistema kaj altnivela terminologia laboro en Esperanto, montris la reapero de æi-tema aranĝo sub la kadra temo "Terminologia laboro: Stato, problemoj, perspektivoj". Tie *Wera Blanke* resumis la rezultojn, spertojn kaj problemojn de la Terminologia Esperanto-Centro de UEA (TEC), informis *Christer Kiselman* pri la reviziado de matematikaj kaj statistikaj terminoj en PIV, prezentis *Karl-Hermann Simon* la multlingvan forstistan „Lexicon silvestre“ kaj *István Gulyas* la same progresantan fervojistan fakvortaron.

Dum la sekvanta ĝenerala diskuto klare montriĝis, ke necesas reaktivigi TEC, trovi konvenan gvidanton / kunordiganton kaj precipe starigi novajn labormanierojn kongruajn kun la modernaj komunikebloj.

Dum æi tiu terminologia aranĝo la hispana lingvisto *Lluís de Yzaguirre í Maura* prezentis prelegon pri la temo „la rolo de teknologio en la estonteco de la lingvoj“, kiu plene kaptis la intereson de la aŭskultantoj. Pro tio ni donas la resumon sube.

### 1.4 Esperantologia konferenco

Dum la esperantologia konferenco *Marc van Oostendorp* prelegis pri lingvistiko en la reto kaj *Ilona Koutny* pri „komputikaj ebloj kaj bezonoj en la leksikografio de Esperanto“. *Christer Kiselman* informis pri la nove aperinta revuo „Esperantologio/Esperanto Studies“..

### 1.5 Seminario: Lingvoj en Interreto

Dum aparta aranĝo la prelegantoj traktis la rolon de lingvoj en la interreto. *Marc van Oostendorp* faris enkondukan prelegon pri la kadra temo.

*Martin Haase* traktis la rolon de la germana en la reto, kaj *Ilona Koutny* karakterizis problemojn de la interkultura komunikado per sia prelego „Internaciaj lingvo kaj kulturo en la Interreto“.

## **1.6 Pri minoritata lingvo**

Kvankam estas tradicio, per ekspresa kurseto enkonduki en la lingvon de la gastlando, oni ĉifoje prezentis la eble plej konatan (kaj de la germana lingvostrukture plej distancan) minoritatan lingvon en Germanio, la soraban. La kurson gvidis *Michael Wolf*.

## **1.7 Lingvistoj rigardis la kongreson**

Jam kelkfoje diversaj homoj havis la ideon, ebligi al lingvistoj rigardi universalan kongreson, por ke ili mem spertu, kiel la lingvo funkcias.

Dum la 84-a tiu ideo estis realigita la unuan fojon iom pli sisteme. En diversaj landoj kaj per la reto estis distribuita informo pri la kongreso kiel lingva fenomeno, ke interesitaj lingvistoj povus senpage partopreni, rigardi aranĝojn, intervjui homojn, sperti la unusemajnan lingvo-komunumon.

La prikongresa cirkulero, kiun ricevis centoj da lingvistoj, inter ili tre gravaj kaj konataj, en si mem jam havis supozeble pozitivan informan efikon pri Esperanto. Deko da profesiaj lingvistoj el Germanio utiligis la inviton kaj cirkulis tra la kongreso. Ili havis kontaktojn kun interlingvistoj kaj esperantologoj sed ankaŭ kun „kutimaj“ kongresanoj. Aparte impresa por ili estis la libroservo, la verŝajne plej forta argumento pri la kulturo kaj tradicio de la lingvo, ja ofte pridubata.

Kompreneble la lingvistoj aparte interesiĝis pri la Nitobe-simpozio (vidu sube), ĉin partoprenis. Tie ili aŝskultis eminentajn kolegojn, kiuj aparte prelegis pri la lingva situacio en Eŭropo, pri lingva diskriminado kaj hegemonio.

## 1.8 La Dua Nitobe-simpozio

NITOBĖ Inazô estis asista Ĝenerala Sekretario de Ligo de Nacioj dum la dudekaj jaroj kaj iniciatis/prezentis la faman raporton pri Esperanto ĉe la Ligo (nuntempe oni ankoraŭ trovas lian portreton sur japanaj monbiletoj).

Laŭ li oni baptis serion da lingvopolitikaj simpozioj, direktitaj al la neesperantista lingvopolitika mondo. La kongresoj, en kies kadroj ili okazas, povas esti komprenataj kiel lingve sendiskriminaciaj multnaciaj aranĝoj, kiuj ilustras la ĉefajn temojn, ĉiam ligitajn al lingva demokratio kaj lingvaj rajtoj.

Prelegas famaj lingvistoj kaj lingvopolitikistoj en naciaj lingvoj (okazas interpretado inter la lingvoj de la simpozioj en/el Esperanto(n)).

La unua simpozio okazis 1996 en Praha (aperis la aktoj<sup>1</sup>). La dua okazis kadre de la 84-a sub la kadra temo „*Tutmondiĝo kaj lingva diverseco*“. Ankaŭ ĉi-foje prelegis konataj lingvistoj.

La ĉi-subaj prelego-temoj bone karakterizas la celojn de la simpozio, nome konsciigi pri lingva samrajteco kaj per tio kontribuante al la pli bona kompreno de la lingvopolitika potencialo de uzo de internacia planlingvo.

*prof. Ulrich Ammon* (Univ. Duisburg): „La plej gravaj lingvoj en Eŭropo kaj la Eŭropa Unio“,

*d-ino Tove Skutnabb-Kangas* (Univ. Roskilde, Danio): „Kiel novaj evoluoj en lingvaj rajtoj povas stimuli la lingvodiversecon ?“,

*Claude Piron* (Univ. Ĝenevo): “Psikologiaj aspektoj de la lingvo-problemo“,

---

<sup>1</sup> Fettes, Mark/ Bolduc, Suzanne (1998): Al lingva demokratio. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 212 p., (kun tekstoj kaj resumoj en Eo, la angla kaj la franca, mendebla ĉe UEA). En la septembra numero (1999) de la hungara aplik-lingvistika revuo „Modern Nyelvoktatas“ (t.e. Moderna Lingvoinstruado) p. 98 - 99 aperis recenzo de Maria Cz. Farkas, kiu ripetas la por-esperantajn argumentojn de la libro mem (laŭ informo de Blazio Vaha).

*prof. Rainer Arntz* (Univ. Hildesheim): “Multlingva Eýropo – defio por la teknika interkomunikado”,

*prof. d-ro Robert Phillipson* (Univ. Roskilde, Danio): „La angla kiel internacia lingvo: Kelkaj politikaj, pragmataj kaj lingvistikaj aspektoj“,

*prof. Fawzia Alashmawi* (Univ. Øenevo): “ La klasika araba lingvo kiel unu el la oficialaj lingvoj de la Unuiøintaj Nacioj: lingvistika unueco kaj dialekta diverseco“,

*Bojan Brezigar* (prezidanto de la Eýropa Oficejo por Minoritataj Lingvoj): La nuna stato de lingvoj kaj la situacio de minoritataj aý regionaj lingvoj“.

Detlev Blanke

## **2 Neýtralaj lingviloj**

*Lluís de Yzaguirre í Maura*

(Resumo de prelego kadre de la terminologia kunveno dum la 84-a UK)

### **2.1 La rolo de teknologio en la estonteco de lingvoj**

Evidentas, ke la lingvoj, kiuj ne atingis skriban formon, havas pli da eblecoj malaperi pro malprestiø, malfacila transdonado al novaj generacioj, ktp. Same influas lingva teknologio æe nunaj lingvoj: ekzemple, lingvoj sen sinteziloj aý rekon-kapablo estos malpli allogaj kaj per ili ne eblos voæa kontrolo de aparatoj, diktado de tekstoj, ktp. Kaj sen tiuj eblecoj ili fariøos netaýgaj por profesia agado: post nur malmultaj jaroj komputiloj ne uzos klavaron, æar ili rekonos lingvojn kiel la angla, la rusa aý la hispana.

### **2.2 La rolo de merkataj leøoj en la produktado de lingviloj**

Plej multe la produktadon de lingviloj ( = æiuspecaj informatikaj programoj, datumoj aý fizikaj komplementoj, kiuj uzas aý transformas lingvajn sciojn) entreprenas privataj firmaoj, kiuj, laý ekonomia logiko, seræas monan profiton. Do, kiam temas pri lingvo kun malmultaj parolantoj aý kies plej multaj parolantoj ne kapablas uzi aý eæ aæeti tiujn teknologiojn, la entreprenoj neniel konsideras la eblecon adapti siajn lingvilojn, precipe se la lingvo uzas apartan alfabeton, aý estas ege disa el tiu originala. Aparta situacio estas tiu de minoritataj lingvoj, kies parolantoj estas ofte dulingvaj: ili povas aæeti la

lingvilon en la superstrata lingvo sed ne (aŭ multe pli koste) en sia gepatra lingvo (simile okazas al esperantistoj).

## 2.3 Alternativoj

Hodiaŭ pli kaj pli ekzistas aŭ estas projektitaj normoj por interŝanĝo de ĉiuj specoj de lingvaj datumoj: tekstoj (kaj skribaj kaj parolaj), vortaroj, terminografioj, sintaksaj arboj, ktp. Sed mankas publikaj (nekomercaj) lingviloj, kiujn oni povu senkoste adapti por senteknologiaj lingvoj. Ekzemple, vortkontrolilo por la franca (kiu posedus listojn kun leksiko, onomastiko, sigloj kaj mallongigoj) povus esti facile adaptita por aliaj fleksiaj lingvoj, kiel la okcitana. Aglutinaj lingvoj bezonas alian kontrol-strategion, sed ankaŭ ĉi estas disdividebla de pluraj tipologie najbaraj lingvoj.

## 2.4 Neŭtralaj lingviloj

Neŭtralaj lingviloj estus tiuj (eĉ komercaj), kiuj estus reuzeblaj por pluraj lingvoj. Por atingi tiun neŭtralecon, necesas, ke la lingvilo estu kapabla legi siajn datumojn el iu publikformata arkivo (kaj, kompreneble, ke ekzistu tiuj datumoj; sed Interreto montris, ke ĉi povas faciligi kolosajn laborojn per kunlaborado de multaj individuoj). Mi ege dubas, ke privataj entreprenoj interesiĝos pri la 3000 parolantoj de la okcitana lingvo en Val d'Aran (Katalunujo) aŭ pri soraboj (des pli pri Esperanto).

Kontraŭe, kulturaj instancoj de EU aŭ Unesko devus esti sentemaj pri la ideo, ke por la plejmulto de la nunaj lingvoj, la danĝero malaperi kreskos proporcie al la diferencoj inter la lingviloj haveblaj ĉe la teknologie plej disvolvigitaj lingvoj kaj tiuj haveblaj ĉe la malmulte evoluintaj lingvoj. Kaj oni devas konsideri, ke parolantoj de senteknologiaj lingvoj estas la plejmulto de la homaro.

Estas multaj specoj de lingviloj, kiujn oni povus koncepti neŭtralaj (mi ekskludas traduksistemojn, pro praktikaj kialoj, ĉar preskaŭ ĉiam unu el ambaŭ koncernataj lingvoj estas potenca, profitdona lingvo). Komunaj bezonoj al ĉiuj ili estas, ke la alfabeto aŭ tiparo estu elekta laŭ la lingvo(j), ke la ordigkriterioj estu difineblaj laŭ la lingvo kaj ke la klavaro estu redifinebla laŭ la bezonataj karakteroj. Jen la diversaj specoj:

2.4.1 Vortkontroliloj, korektiloj kaj stilkontroliloj: antaŭe WordPerfect permesis al la

uzanto modifi la vortarojn; æiuokaze, tiaj lingviloj povus esti komunaj al samtipologiaj lingvoj;

2.4.2 Unu- kaj dulingvaj vortar-konsultiloj: necesas, ke ili akceptu la vortar-enhavon en TEI aý SGML formato;

2.4.3. Lingvistikaj analiziloj (morfologiaj, sintaksaj...): ili povas esti komunaj al diversaj samtipologiaj lingvoj;

2.4.4 Inform-eltiriloj (klasigiloj, termin-elæerpiloj...): ili laboras per la rezultoj de la analiziloj, do, kun la samaj limigoj;

2.4.5 Voæsinteziloj: se ili estas foneme programeblaj, ilia neýtraleco dependas de la fonemprovizo;

2.4.6 Voæ-rekoniloj povus esti parte reuzeblaj, se ili baziøas sur duptupa analizado (unue, fonemrekonado kaj poste lingvospecifa ortografiigo de parolo al teksto);

2.4.7 Konkordanc-produktiloj.

## **2.5 Ireblaj vojoj**

Oni povas plurmaniere kunlabori pri la ekzisto de neýtralaj lingviloj:

2.5.1 Mem produkti ilin (laý iniciatoj kiel Linukso);

2.5.2 Dissemi sinergiajn konceptojn (ekzemple apogante ekolingvismon, socian diversecon, lingvan toleremon; montrante teknikajn avantaøojn de neýtralaj lingviloj);

2.5.3 Proponi al famaj lingvistoj manifeston por evoluigo de senteknologiaj lingvoj;

2.5.4 Starigo de Centro por produktado kaj distribuado de lingviloj: tiu-æi estas la plej ambicia celo, kaj devus esti gvidata de internacia instanco kiel Unesko aý Ligo de Universitataj Centroj. Øin oni devus postuli en la manifesto.



### **3 Interlingvistiko kaj esperantologio en sciencaj konferencoj kaj kongresoj**

#### **3.1 Internacia studenta kongreso en Vladivostoko**

De la 25-a ĝis 30-a de oktobro 1999 en la malproksim-orienta rusia urbo Vladivostoko okazis

la 3-a Internacia Studenta kongreso de Azi-Pacifikaj Landoj en la kadro de Malproksim-Orienta Ŝtata Teknika Universitato. Ĉin partoprenis entute pli ol 1000 studentoj kaj gastoj el 4 landoj: Ĉinio, Japanio, Koreio kaj Rusio.

Kadre de la kongreso funkciis la sekcio "Interlingvistiko kaj Esperantologio", kiu kunsideis en la profesora klubo de la universitato. La sekcion partoprenis ĉirkaŭ 20 personoj el Vladivostoko, Naĥodka kaj el Japanio.

La eksterlandan grupon el 5 kongresanoj gvidis s-ro MIYAZAWA Naoto, vic-sekretario de

Hokkaida Esperanto-Ligo. La sekva simila kongreso okazos dum septembro de la jaro 2001.

(Laŭ Aleksandr Titajev, Vladivostok, Rusio  
[oriento@mail.ru](mailto:oriento@mail.ru))

#### **3.2 Esperanto - denove en lingvistika hungara konferenco**

Dum la 8-a Hungarlanda Konferenco de Ĝenerala kaj Aplika Lingvistiko denove estis lanĉita interlingvistika sekcio. Tio povis okazi danke al tio, ke pasintjare konsiderinda nombro da interlingvistoj/esperantologoj partoprenis la laboron de tiu nova sekcio per altnivelaj prelegoj (kp. Ipl N-ro 25/2.3).

La ĉi-jara konferenco de hungaraj lingvistoj okazis en la urbo Veszprém (8a –10-a de aprilo) kaj inter la 460 partoprenantoj denove ankaŭ ĉeestis pluraj esperantistoj.

Dum la unua vespero ĉe la rondtabla diskuto pri la temo „*Mondlingvo kaj regionaj lingvoj*“ la gvidanto György Szépe, la prezidanto de la landa lingvista asocio, pozitive parolis pri la rolo de Esperanto, prezentante nian lingvon kaj la anglan kiel nurajn realajn

kandidatojn por fariøi mondlingvo kaj klare agnoskante la jaman (delongan) ekziston kaj ekzistorajton de Esperanto entute.

En la Interlingvistika Sekcio, kiun estris *Ilona Koutny*, okazis la sekvaj prelegoj:

- Katalin Smidéliusz: *Lingvoplanado kiel pedagogia rimedo en la edukado de filologoj, interlingvistiko vivproksime;*
- Francesco Felici: *La internacia komunikado kaj proponoj de la jarcentfino: „eýroklonoj” kontraýlogikaj lingvoj;*
- Ilona Koutny: *Interkultura komunikado kaj Esperanto;*
- Michael Farris: *La TTT kaj la disvastigo de la internaciaj helplingvoj;*
- Blazio Wacha: *Dulingveco, variantoj, Esperanto;*
- Zsuzsa Varga-Haszonits: *La teorio de lingvopriskribo kaj Esperanto.*

La prelegojn aýskultis kaj partoprenis en la postaj diskutoj ankaý lokaj esperantistoj.

Dum la konferenco estis disdonata la tria volumo de la pasintjara konferenco en kiu legeblis

la prelegoj de *D. Blanke, I. Koutny, O. Prytz, Á. Rátkai, K. Smidéliusz, B. Wacha.*

La volumon plurfoje trafolumis dum tiuj tagoj centoj da lingvistoj kaj povis legi en øi pri kaj ankaý en Esperanto plurajn interesajn artikolojn. Tio estis sendube bona propagando por la internacia lingvo.

Diskutante pri la pluaj paþoj kaj estonteco la æeestantaj esperantistoj interkonsentis sekvontjare aliøi ne al la interlingvistika sekcio, sed prefere disvastigi per siaj prelegoj informojn pri Esperanto kaj ties valoroj en aliaj sekcioj de la konferenco.

La ideala solvo, evidente, estus, se partoprenus la altnivelan konferencon tiom da esperantologoj, ke la nombro sufiæu kaj por la interlingvistika sekcio, kaj por partopreno en la laboro de la aliaj sekcioj. Por realigi tiun idealon ni bezonus almenaý dek-dekdu

prelegojn kaj antaŭan strategian kunlaboron, kiun volonte kunordigos la verkinto de la supra raporto. Interesiĝantoj sin turnu al:

Katalin Smidéliusz [smidik@fsd.bdtf.hu](mailto:smidik@fsd.bdtf.hu)  
Kós Károly u. 29, HU-9700 Szombathely

### **3.3 Dum konferenco de GAL pri Esperanto kaj kulturo**

La kadra temo de la 30-a konferenco de la germana organizaĵo Gesellschaft für Angewandte Linguistik e.V., GAL (Societo pri Aplika Lingvistiko), kiu okazis de 30-a de septembro ĝis 2-a de oktobro 1999 en Frankfurt/Main, estis „Lingvo kaj kulturo“.

Ĉin partoprenis *Sabine Fiedler* per prelego pri „(Plan-)Lingvo kaj kulturo: Pri reflektiĝo de kulturo en la leksiko de Esperanto“.

### **3.4 Pri propedeŭtiko en konferenco pri lingva akiro**

Kadre de la anglalingva Tria Konferenco pri L3-lingva akiro kaj trilingvismo, kiu okazis de la 16-a ĝis 18-a de septembro 1999 en Innsbruck/Aŭstrio, Bernd Finger prelegis pri la „Propedeŭtika valoro de Esperanto. Ĉu planlingvo povas faciligi la lernon de tria lingvo?“

### **3.5 9-a konferenco de GIL pri eŭropa lingvo-politiko**

La faka programo de la 9-a konferenco de la germana scienca organizaĵo Gesellschaft für Interlinguistik e.V., GIL (Societo pri Interlingvistiko), kiu estas neesperantista organizaĵo, estis dediĉita plejparte al la lingvopolitiko en Eŭropo.

La ĉi-teman programon GIL aranĝis kune kun alia germana lingvistika organizaĵo, kun Verein zur Förderung sprachwissenschaftlicher Forschungen e.V, VFsf (Societo por akcelo de lingvistikaj esploroj).

La konferenco okazis de 12-a ĝis 14-a de novembro 1999 en Berlin. La aranĝon malfermis la prezidantoj de VFsS *d-rino habil. Erika Ising* kaj de GIL *d-ro sc. Detlev Blanke*. Pli ol 80 lingvistoj aŭskultis la 13-an de novembro jenajn prelegojn:

Max Hans-Jürgen Mattusch (Düsseldorf): „*Lingva multeco – malbeno aŭ beno ?*“

Ronald Löttsch (Berlin): „*Pri la tipologia riĝeco de eŭropaj lingvoj*“

Vitalij G. Kostomarov (Moskvo, prezidanto de la monda federacio de instruistoj de la rusa lingvo): „*La rusa kiel internacia lingvo*“

Barbara John (komisiito pri demandoj rilate eksterlandanojn ĉe la senato de Berlin): „*La multlingva situacio de Berlin*“

Johannes Klare (Berlin): „*Lingvopolitiko laŭ franca vidpunkto*“

Detlev Blanke (Berlin): „*Eŭropa lingvopolitiko kaj planlingvoj*“

Peter Kittelmann (ĝis junio 1999 membro de la Eŭropa Parlamento): „*Lingva juro kaj praktiko en la Eŭropa Parlamento*“

La 14-an de novembro la membroj de GIL daŭrigis sian konferencon sen la gastoj de VFsS kaj aŭskultis jenajn prelegojn:

- Vera Barandovská-Frank, Paderborn : „*La Eŭropa Klubo kaj Ĉu Eŭropo vere ekzistas ?*“

- Sabine Fiedler, Leipzig: „*Bela dam', ĉu al vi plaĉus, se akompanon mi kuraĝus ?*“ – *Pri la traduko de Faŭsto de Goethe en Esperanton*“

- Karl-Hermann Simon, Eberswalde: „*Spertoj ĉe la terminologia prilaborado de la forsta faklingvo*“

Johann Pachter prezentis aparte bone elektitan libro-oferton, kiu tre impresis la lingvistojn.

La Jarkunveno de GIL elektis sian novan estaron:

- Detlev Blanke, prezidanto
- Sabine Fiedler, vicprezidanto
- Horst Jasmann, kasisto
- Werner Bormann, membro
- Ronald Löttsch, membro

Kiel jam kutime, la prelegoj estos publikigitaj.

La 10-a konferenco de GIL okazos inter la 17-a kaj 19-a de novembro 2000, same en Berlin. La kadro estos „Planlingvoj inter naturalismo kaj skemismo“. La konferenca lingvo ĝenerale estas la germana, kvankam nedevige.

## **4 Fundamenta verko pri la frazeologio de Esperanto**

Kiel ni jam informis en lpl 28/4., la lingvistino (anglistino kaj esperantologino), d-rino Sabine Fiedler, komence de 1999 habilitiøis en la Universitato de Leipzig, do akiris la prelegrajton kaj nun disponas pri la scienca grado, kiu en kelkaj landoj necesas por fariøi universitata profesoro.

Kiel disertacion ŝi prezentis verkon pri la frazeologio de Esperanto kaj per tio fondis subdisciplinon de la esperantologio.

Sekve ni publikigas ŝiajn tezojn, kiujn ŝi pruvas en la verko, krome liston de ŝiaj publikaøoj. Pri la libro, kiu – surbaze de la disertacio - antaý nelonge aperis, ni informos en lpl 31.

Red.

### **4.1 Planlingvo kaj frazeologio: empiriaj esploroj pri reproduktita lingvomaterialo en Esperanto – tezoj -**

*Sabine Fiedler*

#### **4.1.1 Enkonduko**

Studo pri Esperanto-frazeologio estas science grava pro du vidpunktoj:

**Unue**, temas pri nova esplor-objekto de *frazeologiscienco*<sup>2</sup>.

Ampleksa analizo de planlingvaj frazeologioj, inkluzivanta kaj skribajn kaj parolajn tekstojn, kapablas montri komunajn kaj diferencajn karakterizaĵojn inter etno- kaj planlingvoj koncerne la originon, evoluon, strukturon kaj uzadon de frazeologiaĵoj.

Tiamaniere eblas trovi konojn pri la fenomeno frazeologio, kiuj gravas ankaŭ ekster la okupiĝado pri planlingvoj.

**Due**, prifrazeologiaj analizoj apartenas al jenaj terenoj de *esperantologio/interlingvistiko*, kiuj ĝis nun ne estis intense esploritaj.

Ili estas tamen esencaj, ĉar ekzisto kaj uzado de frazeologio prezentas gravan kriterion ĉe la evoluo de planlingva projekto al plenfunkcianta lingvo.

Krome, frazeologiaĵoj kutime estas rigardataj simboloj de spontaneeco, esprimivo, kultureco - lingvaj karakterizaĵoj, kiujn oni ofte kontestas rilate Esperanton.

#### **4.1.2 Difino kaj klasifiko de Esperanto-frazeologio**

(1) *Frazeologiaĵo* estas plurelementa lingvounuo, pleje idioma, kun relative fiksita strukturo kaj enhavo, kiun parolanto/skribanto reproduktas kaj laŭkutime uzas kiel pretajn unuojn kun intensa funkcio.

La plejmulton de Esperanto-frazeologiaĵoj krome karakterizas la eco de eŭfonio.

Mi subtenas t. n. larĝan difinon de frazeologiaĵo, t.e. ankaŭ flugilhavaj vortoj (inkluzive de libraj kaj filmaj titoloj k.s.) kaj proverboj apartenas al la esplor-objekto.

(2) Frazeologioj ekestas kaj pluevoluas depende de fakta aplikado de lingvo en komunikado. Komenciĝantaj frazeologiaj sistemoj pruveblas ankaŭ en la semi-planlingvoj *Ido* kaj *Interlingua*.

(3) *Klasifikaĵoj* eblas laŭ diversaj kriterioj. Struktur-enhavo orientita subdivido montras, ke la sekvaj tipoj de frazeologiaĵoj precipe gravas en Esperanto:

---

<sup>2</sup> Disertacio en Sovetunio (Mjasnikov 1989), kiu komparis la frazeologiojn de kelkaj

- vortekvivalentoj (ekz. *malvarma milito; interna ideo*)
- øemelaj vortparoj (ekz. *jen kaj jen; finita kaj glatigita*)
- fiksitaj konstruaåoj kun funciaj verboj (ekz. *tiri konkludon; doni atenton*)
- parolturnoj (ekz. *levi la æapelon por iu; povi sian kapon en la sablon*)
- proverboj (ekz. *Æio transmara estas æarma kaj kara; Estu æapo laý la kapo*)
- flugilhavaj vortoj (ekz. *Æu esti aý ne esti ...; per flugiloj de facila vento*)
- komunikaj formuloj (ekz. *Kion fari?; Jam temp' está*).

Klasifikaåoj laý morfologi-sintaksaj kriterioj kaj laý oftaj elementoj montras ne nur la dominon de verbaj frazeologiaåoj kaj de jenaj kun korpopartaj nomoj (t.n. somatismoj) en la planlingvo, sed ankaý, rilate al koloroj kaj bestonomoj, kulturdependaj specifaåoj de Esperanto-frazeologio.

La specifaåo de Esperanto-frazeologio antaý æio montriøas en *klasifiko laý origino*.

Estas distingataj tri grupoj:

**(a)** La laýnombre plej grandan grupon formas unuoj, kiuj venas en aktualan lingvo-uzon sub influo de gepatra lingvo.

Temas pri tradukpruntaåoj kaj *ad-hoc*-transprenaåoj, kiel ekz. *lavi al si la manojn; perdi la kapon; turni la dorson al iu/io; reinventi la radon/biciklon*.

Pro la situacio de Esperanto, kiel komunikilo de fremdlingvo-komunumo esti en æiama kontakto kun plej diversaj etnolingvoj kaj pro specifaåoj de lingva strukturo, kiuj favoras la transprenon de leksika materialo, tiu æi parto de Esperanto-frazeologio estas precipe riæa. Æi-rilate montriøas paraleloj al fenomenoj de lingvokontakto æe dulingvaj parolantoj, konataj pri la frazeologio ekzemple de la soraba lingvo aý æe parolantoj de la germana en Hungario.

**(b)** Specifaåo de planlingva frazeologio estas la konscia kreado de unuoj.

---

etnolingvoj kun tiu de Esperanto bedaýrinde restis internacie nereflektita.

La due plejgrandan grupon inter la kolektita materialo formas frazeologiaĵoj 'planitaj' fare de Zamenhof laŭ etnolingvaj modeloj kaj publicitaj en *Proverbaro Esperanta* (1910), ekz. ***Estas tubero en la afero; en la triaŭda semajno.***

Laŭ miaj analizoj, tamen, nur eta parto (6,8%) de la zamenhofaj unuoj fariĝis ĝenerala propraĵo de la lingvokomunumo, kio montras la limigitecon de planaj procezoj en funkcia planlingvo.

**(c)** La trian grupon konstituas frazeologiaĵoj, kiuj havas sian originon en la kulturo de Esperanto kaj de la parolkomunumo mem.

Ili spegulas i.a. :

trajtojn kaj vivmanierojn de parolantoj (ekz. *eterna komencanto; esperanto - edzperanto*),

kolektivajn idealojn kaj celojn (ekz. *Ne krokodilu!; fina venko*),

komunikajn historion (ekz. *Manifesto de Raŭmo; bulonja deklaro*),

tradiciojn (ekz. *interkona vespero; pasporta servo*),

Esperanto-literaturon (ekz. *la bona lingvo; La nepoj nin benos*)

kaj ne kompreneblas sen la koncernaj soci-kulturaj fono-scioj.

La ekzisto de tia memstara grupo de frazeologio pruvas, ke la tezo pri 'senkultura' planlingvo estas nedefendebla.

### **4.1.3 Evoluo de Esperanto-frazeologio**

**(1)** Kiel instrumentoj de empiria studado montriĝas efikaj: teksto-analizo, partoprenanta observado kaj enketo inter la parolantaro<sup>3</sup>.

---

<sup>3</sup> Al mia internacia enketo helpe de demandiloj en la revuo de UEA, „Esperanto“ 4/1995, reagis pli ol 500 parolantoj.



La analizoj havas *sinkronan* karakteron, kio tamen ne ekskluzivas detalajn studojn pri estiĝo kaj evoluo de unuopaj frazeologiaĵoj kaj prifrazeologiaj komparoj kun historiaj tekstoj.

Tiuj pruvas por la kampo de frazeologio la elformiĝon de *diakrona* ebena, kiun Ferdinand de Saussure (1916: 111) antaŭdiris por la planlingvo.

**(2)** Pluevoluo de Esperanto-frazeologio okazas en streĝo-kampo de du kontraŭaj klopodoj.

Tio estas unuflanke la celado (malhelpanta al transpreno kaj uzado de novaj - precipe idiomaj - unuoj el etnolingvoj) certigi kondiĉojn por transkultura interkompreniĝo per Esperanto por tiamaniere sekurigi la ekziston kaj disvastigon de la planlingvo.

Tiu motivo estas parte kunligita kun la deziro konservi la 'zamenhofan heredaĵon'.

Aliflanke ekzistas la aspirado je frazeologia varieco (akcelanta la akceptadon de fremda materialo) por tiamaniere pruvi, ke Esperanto estas same evolukapabla kaj esprimiva kiel etnolingvoj.

#### **4.1.4 Uzado de frazeologiaĵoj**

(1) Frazeologiaĵo atingas sian plenan komunikan efikon nur per sia uzo en specifa situacio-konteksto. Tie montriĝas la *tekstkonstitua* kaj *koheriga* roloj de frazeologiaĵo.

Specifaĵoj dum uzado de Esperanto-frazeologiaĵoj en *ĵurnaloj* estas la ofta apliko de metakomunikaj signaloj, kio estas esprimo de evoluinta lingvokonscio de la parolantoj, kaj ankaŭ la granda nombro da laŭtekste modifitaj unuoj.

La uzado de frazeologiaĵoj en noveca maniero montras, *unue*, la specifajn potencojn de la planlingvo al lingvo-ludaj aplikoj, *due*, ilustras la ŝojon de parolantoj dum lingva okupiĝo.

Krome en ĵurnalaj tekstoj troveblas ekzemploj de strebado al klarbildeco kaj memprezentado.

Kontraŭe al tio en *fakaj tekstoj* malofte utiligatas la multspecaj eblecoj de koheriga reuzado de frazeologiaĵoj.

Depende de temoj kaj komunikaj intencoj ĉi-tie troveblas nur eta nombro da frazeologiaj unuoj kaj nur limigita aro da specoj.

Tamen, kiel estas prezentita per ekzemploj, tio ne signifas, ke (parte) idiomaj frazeologiaĵoj kaj fakaj tekstoj estas reciproke principe ekskluzivaj.

En la analizitaj *parolaj tekstoj* (dumkonferencaj prelegoj, intervjuoj, debatoj, ĉiutaga konversacio) frazeologiaĵo ofte servas al argumentado. Kun tio povas esti ligita la deziro de parolanto montri la propran fremdlingvan kompetentecon. Variado de frazeologiaj elementoj pli ofte troveblas en parolaj tekstoj ol en skribaj.

Alia specifaĵo de parola komunikado estas la granda nombro da komunikaj formuloj direktitaj al stirado de konversacio, al memkorektado kaj al sekurigado de partneraj rilatoj (ekz. *ĉajnas al mi; ni diru; ĉu ne*).

En *beletraj tekstoj* precipe valoras la intensiga funkcio, kiun frazeologiaĵo kapablas realigi antaŭ ĉio pro siaj stilistikaj konotacioj, sian t.n. enhavan plusvaloron.

Frazeologiaj unuoj estas utiligataj por *karaktizado de figuroj* ('lingva portreto').

Krome en originala literaturo Esperanto-specifaj frazeologiaĵoj peras la kulturon de la parolkomunumo. Ĉe tio kiel dominaj funkcioj percepteblas *identekonfirmo* (per komuna 'kompliceca' lingvouzo surbaze de specifa fono-scio), sed ankaŭ *memironia kritiko* (per senrespekta traktado de klasika Esperanto-lingvaĵo, ekz. de Zamenhof-citaĵoj).

(2) Analizoj pri *tradukado* de frazeologiaĵoj evidentigas, ke frazeologia unuo en tradukologia fakliteraturo prave rigardatas traduka problemoj.

En Esperanto-tradukoj, kiuj tradicie gravegas por la planlingva komunikado, aldone konsiderendas la faktoro de heterogena legantaro.

La tradukado de frazeologiaĵoj en Esperanton estas kompleksa procezo sub influo kaj de tradukkomplikaj kaj traduksubtenantaj kondiĉoj.

La tradukon malfaciligas i.a. internacia legantaro, kulturdependa karaktero de frazeologiaĵoj, individuaj aŭtoraj stiloj, parte mankanta historia dimensio de Esperanto.

Favoraj estas ekz. konteksta subteno, internacieco de multaj unuoj, traduka direkto: el la gepatra lingvo.

Æefaj tradukmetodoj estas (en laŭkvanta ordo)

(a) transpreno de internacie konata frazeologiaaŭo de la sama bildsfero (ekz. *go to the devil* - *iri al la diablo*; *zwischen zwei Stuehlen sitzen* - *sidi inter du seøoj*),

(b) senfrazologia parafrazo (ekz. *to lose one's head* - *konfuziøi*; *sich am Riemen reißen* - *ekregi sin*),

(c) substituo per frazeologiaaŭo el alia bildsfero (ekz. *to be in deep waters* - *esti en la kaæo*; *jmdm. die Figuren vom Brett nehmen* - *forpreni de iu æiujn atutojn el la ludkarto*); diversaj submetodoj diferencigeblas.

#### **4.1.5 Finaj rimarkoj**

La analizoj ne nur pruvas, ke Esperanto posedas evoluantan frazeologian sistemon, ili ankaŭ respondas fundamentajn demandojn pri la esenco kaj funkciado de planlingvoj.

Tio koncernas pruvon kaj de konsciaj kaj spontaneaj faktoroj en la lingvo-evoluo, la provizadon je empiriaj lingvodatumoj kiel dokumentoj por dinamika memstara planlingva evoluo surbaze de lingva normo kaj ankaŭ la econ de Esperanto speguli kulturspecifaŭojn.

Kelkaj rezultoj, trovitaj por la frazeologio de Esperanto, validas ne nur por la planlingvo.

Studoj pri Esperanto donas la eblecon observi lingvon ekde øia estiøo øis øia nuntempo - kvazaŭ sub laboratoriaj kondiæoj - kaj tiamaniere gajni scion pri strukturo, funkciado kaj evoluo de lingvoj øenerale.

Tiuj potencoj estu utiligataj, ankaŭ ekster la frazeologia tereno, por ekzamenado de lingvistikaj teorioj.

#### **Menciita literaturo**

- Blanke, Detlev (1985): *Internationale Plansprachen. Eine Einführung*. Berlin: Akademie.

- Mjasnikov, Leonid N. (1989): *Principoj stanovlenija i razvitii frazeologii v esperanto i v etnikeskich jazykach (anglijskom, vengerskom, nemeckom, ruskom, francizskom)* (aŭtoro referaĵo). Moskva: Universitato.
- Raŝiĉ, Nikola (1994): *La rondo familia. Sociologiaj esploroj en Esperantio*. Pisa: Edistudio.
- Saussure, Ferdinand de (1916): *Cours de linguistique générale* (denove eldonita 1969). Paris: Payot

## **4.2 Publicaĵoj de Sabine Fiedler**

### **4.2.1 Libroj**

- (1991): Fachtextlinguistische Untersuchungen zum Kommunikationsbereich der Pädagogik (dargestellt an relevanten Fachtextsorten im Englischen) (= Band 1 der Leipziger Fachsprachenstudien). Frankfurt/ a. M. [et al.]: Lang, 222 p.
- (1999): Plansprache und Phraseologie. Empirische Untersuchungen zu reproduziertem Sprachmaterial im Esperanto. Frankfurt/ a. M. [et al.]: Lang, 444 p.

### **4.2.2 Kuneldonado**

- /Busch-Lauer, Ines-Andrea/Ruge, Marion (Hrsg.)(1995): *Texte als Gegenstand linguistischer Forschung und Vermittlung* (Festschrift für Rosemarie Gläser). Frankfurt a. M. [et al.]: Lang, 328 p.

### **4.2.3 Artikoloj en revuoj kaj antologioj**

- (1985): "Kommunikationsverfahren in einem englischen Handbuch der Pädagogik". En: *Linguistische Studien* (Berlin) Reihe A 133, 112-117.
- (1986): "Der Eigenname als Konstituente des pädagogischen Fachwortschatzes". En: *Namenskundliche Informationen Beiheft* 9, 13-19.
- (1987): "Untersuchungen zum pädagogischen Fachwortschatz im Englischen". En: *Berichte der Sektion Fremdsprachen* (Beiträge zur englischen Fachsprachenforschung). Leipzig, 2/1987, 1-22.
- (1988a): "Citiloj - ĉu nur iloj por citi?" En: *der esperantist* 5/1988, 104-106.
- (1988b): "Pri karakterizaĵoj de pedagogiaj fakvortoj en Esperanto. En: *Internacia Pedagogia Revuo* (Budapest) 7-9/1988, 3-8.
- (1989a): "Fachtextlinguistische Untersuchungen zum englischsprachigen Zeitschriftenartikel im

Kommunikationsbereich Geschichte". En: Wissenschaftliche Zeitschrift der Pädagogischen Hochschule Leipzig III/89, 57-60.

- (1989b): "Pri kelkaj fakvortoj en la sfero 'Universitata Medio'". En: Internacia Pedagogia Revuo (Budapest) 2/89, 9-14).

- (1992): "Die pädagogische Rezension im Englischen und Esperanto". En: Baumann, Klaus-Dieter/  
Kalverkämper, Hartwig (Hrsg.): Kontrastive Fachsprachenforschung. Tübingen: Narr, 147-161.

- (1994): "Linguistische Fachtexte im Englischen, Deutschen und Esperanto (ein interkultureller Vergleich)". En: Spillner, Bernd (Hrsg.): Fachkommunikation (Kongreßbeiträge zur 24. Jahrestagung der GAL). Frankfurt a. M. [et al.]: Lang, 68-71.

- (1995a): "Phraseologismen im Esperanto". En: Oelberg, Hermann M. (Hrsg.): Beiträge zur Interlinguistik. (= Mitteilungen aus dem Institut für Sprachwissenschaft der Universität Innsbruck, Report 7). Innsbruck, 1-30.

- (1995b): "Untersuchungen zur Phraseologie des Esperanto: Sprichwörter". En: Busch-Lauer, Ines-  
Andrea/Fiedler, Sabine/Ruge, Marion (Eld.): Texte als Gegenstand linguistischer Forschung und Vermittlung. Festschrift für Rosemarie Gläser. Frankfurt a.M. [et al.]: Lang, 173-191.

- (1995c): "Fachkommunikation in Plansprache und Ethnosprache. Zu Ergebnissen vergleichender Fachtextanalysen aus interkultureller Sicht". Fremdsprachen Lehren und Lernen 24. Jg. (1995) (Themenschwerpunkt: Kontrastivität und kontrastives Lernen), 182-196.

- (1995d): "Pri Esperanto-Frazeologio. En: Esperanto aktuell 4/95, 7-9; 6/95, 10-12; 8/95, 10-12.

- (1996a): "Norvega rato oder migra rato? Zu Fachwörtern mit onymischer Konstituente im Esperanto". En: Gläser, Rosemarie (Hrsg.): Eigennamen in der Fachkommunikation. Frankfurt a.M. [et al.]: Lang, 121-130.

- (1996b): "Esperanta frazeologio: leksikografiaj demandoj". En: Literatura Foiro Nr. 162, 8/96, 191-199.

- (1996c): "Der Phraseologismus als Übersetzungsproblem". En: Interlinguistische Informationen, Beiheft 1 "Translation in Plansprachen" (Beiträge der 5. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 24.-26.11. 1995), 48-51.

- (1997a): "Intertextualität in der Plansprache (dargestellt an publizistischen und literarischen Texten im Esperanto)". En: Klein, Josef/Fix, Ulla (Eld.): Textbeziehungen. Linguistische literaturwissenschaftliche Beiträge zur Intertextualität. Tübingen: Stauffenburg, 383-402.

- (1997b): "Der Phraseologismus als Übersetzungsproblem – dargestellt an Staatsexamensarbeiten von

Lehramtskandidaten im Fach Englisch". En: Fremdsprachen und Hochschule (Bochum) 51, 57-67.

- (1998a): "Zu Merkmalen der Esperanto-Sprachgemeinschaft (Ergebnisse einer Probandenbefragung)". En: Interlinguistische Informationen, Beiheft 4 (Soziokulturelle Aspekte von Plansprachen – Beiträge der 7. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik)

- (1998b): "Esperanto Phraseology: Classification and Usage". In: Peter ĴurĴo (Eld.): EUROPHRAS '97: Phraseology and Paremiology. Bratislava: Akadémia PZ, 96-101.

- (1999a): Zum Übersetzen von Phraseologismen in die Plansprache – dargestellt an literarischen

Übersetzungen im Esperanto. In: Sabban, Annette (Hg.): Phraseologie und Übersetzen. Bielefeld:

Aisthesis Verlag (206 S.), S. 59 – 80

- (1999b): Zur Phraseologie im Enzyklopädischen Wörterbuch Esperanto-Deutsch von Eugen Wüster.

In: Interlinguistische Informationen. Beiheft 5 (im Druck)

- (2000): „Bela dam’, Ĵu al vi plaĉus, se akompanon mi kuræus ? Zur Übersetzung von Goethes Faust in

Esperanto. In: Interlinguistische Informationen. Beiheft 6 (im Druck)

#### 4.2.4 Recenzoj

- Schubert, Klaus (Hrsg.) (1989): Interlinguistics. Aspects of the Science of Planned Languages. En:

Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und Kommunikationsforschung. 5/1992, 517-520.

- Philippe, Benoît (1991): Sprachwandel bei einer Plansprache. En: Sprachtypologie und Universalienforschung 2/1993, 154-155.

- Grassegger, Hans (1992): Asterixübersetzungen im Esperanto. Eine Studie zur Übertragung von

Sprachspielen. En: Esperanto aktuell 2/1994, 15.

- Ojala, Jaan (1993): Esperantaj sinonimoj. En: Esperanto aktuell 2/1995, 11.

- Kandiah, Thiru/Kwan-Terry, John (Eld., 1994): English and Language Planning: A Southeast Asian

Contribution. En: Language Problems & Language Planning 3/1996, 281-282.

- Bormann, Werner: Die Hamburger Interlinguistik-Vorlesung. En: Esperanto aktuell 3/96, 10.

- Dahlenburg, Till (1996): Esperanto. Eine neue Brücke zur Welt. En: Esperanto aktuell 1/97, 10.

- Stein, Dieter/Tieken-Boon van Ostade, Ingrid (Eld., 1994): Towards a Standard English 1600-1800. En: Language Problems & Language Planning 2/1998, 194-196.

---

Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) æe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Red.: Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, tel.: ++ 49-30-54 12 633, fakso: ++ 49-30-54 56 742. < blanke.gil@snafu.de > Mendojn oni direktu nur al UEA, kontribuojn nur al la redaktoro, se eble per la retpoŝto aŭ diske. Artikoloj sen indiko pri aŭtoreco estas de la redaktoro. Represo kun fontindiko permesata. Estas bibliografiitaj nur posedataj materialoj. Bv. sendi ilin al la redaktoro.

---